



# Boletín

nº 379 mayo/julio



*Asociación de utilidad pública*

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
Aperanta de 1949  
Numero 379 (majo-julio, 2007)

## Ĉefredaktanto:

Jorge Pavón

## Kunlaboris:

Salvador Aragay, Angel Arquillos, Antonio del Barrio, José Añó, Augusto Casquero, Renato Corsetti, José Luis Cruz, Fabián Jiménez Francisco Javier Moleón.

Korektado: Alejandro Pareja



bulteno@esperanto.es  
Calle Juliana n°4  
El Escorial (Madrid) 28280

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj.

\*La redaktisto rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Estas permesite republikigi la enhavon menciante la fonton kaj sciiginte la redakcion

Hispana Esperanto Federacio  
Federación Española de Esperanto  
Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7;  
ES-28015 Madrid  
admin@esperanto.es  
Tel (34) 914468079  
Konto ĉe BBVA:  
0182-1252-31-0204011961

## Estraro

**Prezidanto:** Augusto Casquero

**Vicprezidanto:** Lupe Sanz

**Sekretario :** Carmen Suárez

**Kasisto :** Pedro Garrote

**Voĉdonantoj :** José María Galofré,  
Luis Hernández kaj Jorge Pavón

Presejo: Gráficas Aurora. Zaragoza  
DL- Z- 334-90

## Prezento



Saluton denove estimataj legantoj,

Ĉu esperanto iam havos oficialan rolon en la Eŭropa Unio? Tiu ideo ripetigas plurfoje en nia numero. Kvankam esperanto ege taŭgas por tiu institucio, la socio ĝenerale ignoras tiun solvon, tiel do, antaŭ ĉio ni agnosku, ke ni devas pli bone informi al la publiko, ĉar multaj homoj havas eraran nocion pri nia lingvo aŭ tute ne konas ĝin. Nur se sufiĉe multe da homoj favoras esperanton, politikistoj iam interesiĝos. Kelkfoje venas proponoj pli aŭ malpli trafaj (paĝo 19) por solvi la lingvan problemon en la EU, sed nuntempe esperanto povas prezenti sin kiel realisma eblo. Do, ni *semas kaj semas konstante*, kiel Zamenhof diris.

Nia kongreso estas ĉiujare loko por interŝanĝi spertojn, kunigi fortojn, starigi personajn rilatojn kaj diskonigi esperanton. Novaj libroj prezentitaj estis la vortaro 'Amika' kaj traduko de Platero kaj Mi. Rilate al la Kongreso vi trovos la salutmesaĝon de Renato Corsetti, kaj unu el la prelegoj.

Kompletigas la revuon eseo el La Ondo de Esperanto, poemo de Javier Moleón venkinta en la konkursoj de UEA kaj multaj aliaj temoj.

Fine, mi volas rememorigi al ĉiuj ke Boletín celas esti revuo proksima al la legantaro, tiel ne hezitu sendi artikolon, informon pri interesa evento kiun vi ĉeestis, loka aktivaĵoj, kursoj, ktp

Havu agrablan kaj profitdonan legadon!

Estrarkunveno de HEF.....	2
Ĝenerala Kunsido.....	4
Pri grupoj, asocioj kaj tiel plu.....	5
Valencia-Murcia Kongreso .....	8
Historio de ESTO .....	9
Kio okazis en Palos? .....	11
Nova vortaro .....	13
Kongresaj konkludoj.....	13
Renato Corsetti salutas la kongreson.....	14
Historia libro de A. Marco Botella.....	16
Gimnazianoj en Eŭropo konatiĝas dank'al esperanto .....	17
Sporto kaj esperanto kunigas kulturojn .....	18
Europaio, nova provo forigi Babelon .....	19
Esperanto-gazetaro: historio, nuntempo kaj perspektivoj .....	20
Nobel-premiito proponas esperanton por EU .....	25
Parlamentaria seminario pri diskriminacio en EU .....	25
Ĉirkaŭ la mondo .....	26
Vidpunkto: La nova generacio .....	27
Klaku.net .....	29
Literaturo:Sed Tiam .....	30
Kelkaj fotoj pri la kongreso .....	posta kovrilo
KOVRILO FOTO: Replikoj de la karaveloj kiuj eltrovitis Amerikon. <i>Palos de la Frontera</i>	

## Estrarkunveno de HEF 2007-02-26

Okazis la lundon 4an de junio, ĉe la sidejo de HEF. Ĉeestis la estraranoj: Carmen Suárez; Jorge Pavón; Pedro Garrote kaj ne estraranoj: Darío Rodríguez, Alejandro Pareja, Manolo Parra

### 1. Hispana Kongreso (kun la Andaluzia) en Palos (Huelva) 5a ĝis 8a de julio

➤ Oni parolis pri la estraranoj kiuj ĉeestos kaj pri la diversaj punktoj de la tagordo de la Ĝenerala Kunsido

➤ Sekva Hispana Kongreso : Alejandro Pareja estus preta por organizi ĝin en

Cuenca. Oni pridiskutos tion en la Ĝenerala Kunsido.

### 2. Kontoj

➤ **Dumvivaj membroj:** Kun la intenco peti de ili monan helpon, oni reviziis la liston de membroj kun kategorio de dumvivaj, kaj konstatis ke la plej multaj havas altan aĝon, do oni rezignis la ideon leteri al ili. Restas nur la afero de KAE (La Prezidanto parolos kun KAE dum la kongreso).

➤ **“Libro de Actas”:** La protokolojn oni skribas komputile. Por printi ilin rekte en oficialajn foliojn oni devas peti al

Registro Mercantil leĝe stampitajn foliojn, kiuj estos la oficiala protokola libro (kosto proksimume 14,24 eŭroj).

➤ **Aĉetado de la vortaro “Amika”**: Oni aprobis aĉeti 10 ekzemplerojn dum la kongreso. HEF havas grandan stokon de la vortaro Sopena.

➤ **Agencia Tributaria de Madrid** konfirmis ke HEF, kiel asocio de publika utilo, ne devas pagi la imposton “**IBI**” por la proprieto de sia sidejo.

➤ **Telefono**: HEF ricevis favoran respondon de *Oficina del Consumidor* rilate la malabono de la kompanio ONO, kaj ĝiaj fakturoj. Aktuale HEF pagas fakturon al TELEFONICA (por la telefon-linio), al JAZZTELL (por la alvokoj kaj interreto), al LATECLA por la uzado de ”esperanto.es”. La spaco en la reto estas donaco de Miguel Angel Sancho.

### 3. Petoj kaj demandoj

➤ En 2009 okazos la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Oni aprobis ke HEF apogos la projekton de Toño del Barrio por 2009.

➤ Peto de poŝtmarko: Toño jam sendis leteron je la nomo de Fundación kaj HEF. La respondo de Correos venos je la lastaj monatoj de 2007

➤ Boletín ĉe HEF-paĝaro: Oni aprobis ke Jorge Pavón enretigos ĉiun novan

numeron ĉe “lernu.net” kaj “Amikumu” kiam la papera eldono estos atinginta lian hejmon. Por enretigi ĝin en la paĝaro de HEF, Miguel Angel Sancho devas solvi la teknikajn problemojn.

➤ Pedro Garrote proponis informi al ĉiu nova samideano pri la ekzisto de aliaj esperantistoj geografie proksimaj. Oni komentis ke la afero jam estas solvita per la listo de asocioj kiu aperas en la paĝaro de HEF kaj per la diversaj forumoj.

### 4. Ankoraŭ ne solvitaj aferoj

➤ HEF ne ricevis la enspezon de la DVD “Elektronika Esperantio” aĉetita la pasintan jaron

### 5. Venonta kunveno

➤ Landon 17-an de septembro je la 18a

La sekretariino

#### Boletín rete

Sur la bazo de la skanitaj numeroj en Gazetoteko Lanti, ni prezentas en nia ret-paĝaro la kolekton de Boletín ekde ĝia origino en 1949. Ankoraŭ mankas numeroj, ĉefe de la lastaj jaroj, sed iom post iom ni ĝin kompletigos.

[www.esperanto.es](http://www.esperanto.es)

# Ĝenerala Kunsido de HEF

Okazis la sabaton 7an de Julio je la 10a horo matene en la kulturdomo de Palos de la Frontera kadre de la Hispana kaj Andaluzia Kongreso. Partoprenis 22 membroj, 16 ĉeestaj plus 6 reprezentataj. Inter la ĉeestantoj estis la estraranoj: Augusto Casquero, Pedro Garrote kaj Jorge Pavón.

**1. Antaŭa kunsido**, okazinta la 26an de februaro 2007 en Madrido. La protokolo, aperinta en Boletín n-ro 378, estas unuanime aprobita.

## 2. Informo pri membraro:

➤ Informas la sekretariino ke la nuna nombro de membroj estas 274. Dum la jaro 2006 aliĝis 4 kaj malaliĝis 11 (ses el ili pro forpaso).

➤ 12 membroj ŝuldas la kotizojn de 2005 kaj 2006, kaj 31 membroj ŝuldas la kotizon de 2006.

## 3. Komentoj pri la konto-stato kaj agadraporto de la jaro 2006,

➤ Jam estas aprobitaj en la antaŭa kunsido kaj aperintaj en Boletín n-roj 377 kaj 378

➤ La kasisto Pedro Garrote proponas ke oni egaligu ĉiujn kotizojn por simpligi administradon. La propono estas akceptita.

➤ Oni demandas al Emilio Sanz ĉu KAE

ricevis la mesaĝon de HEF rilate al la fino de la kategorio ‘Dumviva membro’ por grupoj. La kialo estas, ke oni ne povas konsideri grupon kiel dumvivan membron pro ilia long-daŭra ekzisto. Emilio Sanz ne konas pri la afero.

## 4. Demandoj, petoj kaj proponoj:

➤ Pedro Hernández proponas ke Boletín, krom papere, estu legebla rete nur por la membroj. Nuntempe Miguel Angel Sancho okupiĝas pri la enretigado de la numeroj novaj kaj malnovaj numeroj en la paĝaron de HEF.

➤ Alejandro Pareja proponas Cuenca por la venonta kongreso. Oni devas trovi kongresejon kaj renkonti kun la urbodomo. La aliĝilo estu disponebla en decembro.

➤ Toño del Barrio estas reprezentata de Manuel Parra. Li rememorigas la proponon ke HEF organizu specifajn projektojn okaze de la jarcentdatreveno de UEA kaj “Internacia Jaron de la Lingvoj” kunvokita de UN kaj en 2009 la 150a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Por realigi tion necesas sufiĉaj volontuloj. La unua paŝo, jam farita, estas peti de la kompanio *Correos* ke ili eldonu poŝtmarkon rilate al Esperanto. Ankoraŭ ne venis pozitiva respondo de la poŝta kompanio.

➤ Augusto proponas celebri specialan

aranĝon okaze de la venonta Z-tago.

➤ La prezidanto informas ke oni kreis komisionon por trakti la nunajn organizajn problemojn de HEF kaj serĉi eventualajn kandidatojn por anstataŭi iujn estraranojn. Pedro Hernández kunordigos tiun komisionon.

➤ Sen pliaj traktendaj aferoj, la prezidanto fermas la kunsidon.

transkribis Jorge Pavón

## Fundación Esperanto

Kiel oni helpu finance la movadon?

Jen la respondo. Kontribuu per:

Iber-Caja

2085-0101-13-0128624762

La Caixa

2100-2149-31-0100165085

## Pri grupoj, asocioj, kaj tiel plu



### Andaluzio

La ĵurnalo “Aula Magna”, eldonita de la Universitato de Malago publikigis ampleksan 2-paĝan artikolon pri esperanto inkludante pri la hispana kaj andaluzia movado, la rilatoj inter esperanto kaj universitatoj kaj pri nia Kongreso en 2007.

### Katalunio

Novaj babiladoj estis organizitaj: ĉe la sidejo de Kataluna Esperanto Fervojista Asocio en Hospitalet kun la temo la emancipiĝo de la virino. Alia okazis la 22an de aprilo en Barcelono pri ‘La junularo’ kun partopreno de 27 homoj.

Esperantistoj partoprenis omaĝon al s-ano Jaime Viladoms (1913\_1976), elstara esperanto-instruisto kaj

fakdelegito de UEA multajn jarojn. Li ankaŭ estis la fondinto de ‘Liceo Jaime Viladoms’ en Sabadell. Oni planas eldoni oktobre libron pri lia instrua agado en la urbo kun aparta mencio al esperanto.

Barcelona Esperanto-Centro celebras ĉijare sian 30-jariĝon. En tiuj jaroj ili kunlaboris pri la eldonado de dek libroj kaj pri la ‘Internacia Esperanto Semajno’ kaj ‘Somera Dialogoj’. Ili nuntempe gvidas kurson en Casinet d’Hostafrancs merkrede de la 19a ĝis la 20a kaj duono. La Centro festis la finon de la Esperanto-kurso, la 27an de junio en sia sidejo “C. C. Casinet”. Dum la kunveno oni pritraktis diversajn temojn inter aliaj la preparo de la novaj kursoj: la supera komenciĝos la 19an de septembro en “Casinet” kaj la baza la 25an de sept-embro en “C.C. Sant

Agusti”. Ankaŭ ĉiuj ĉeestintoj tostis dezirante sukceson por la novaj kursoj kaj ke s-ino Josefina Girona, edzino de la BEC-prezidanto, resaniĝu baldaŭ kaj rapide de sia malsano.



Barcelono, 5a de julio

### Budo de BEC en Firentitats

La 7a *Firentitats* okazis la pasintajn 4an, 5an kaj 6an de majo en la parko “Espanya Industrial” de Barcelono. La festo esti organizita de la sekretario de asocioj pri kulturo kaj sporto de la kvartaloj de Sants, Hontafrancs kaj Montjuik, Partoprenis en la evento pli da 100 asocioj.

Barcelona Esperanto-Centro prezentis en sia budo kolekton da afiŝoj de la UK de UEA kaj siajn lastajn eldonitajn librojn, ”Esperanto en Katalunio” kaj “Diccionari Català - Esperanto”. Organizis la budon Pako Crespo, Pere Espluga kaj Jesús Muñoz

Dum la tri tagoj multaj personoj

interesiĝis pri Esperanto kaj oni disdonis centojn da informiloj “Esperanto Primer Contacto” kaj faris E-lecionojn. Inter la diversaj kontaktoj estas menciinda la babilado kun Xavier Trias de CIU kaj Imma Mayol de ICV, kandidatoj al la urbo-domo de Barcelono.

Salvador Aragay



Budeto de BEC. Foto Jesús Muñoz

### Rememorigo

La venontaj Someraj Dialogoj okazos la 8an kaj 9an de septembro. Interesatoj kontaktu kun:

barcelonaesperantocentro.  
@yahoo.es  
Bassegoda, 40, 3<sup>o</sup>, 1<sup>a</sup>

## Madrido

Dum la monatoj julio kaj junio estis vizitebla ekspozicio organizita de la ministerio pri Loĝado, pri diversaj hispanaj arĥitektoj kiuj devis ekziliĝi ekster Hispanio post la interna milito. La titolo de la evento estas *Arquitecturas desplazadas* (Delokitaj arĥitekturoj). Inter la pritrakitaj profesiuloj troviĝis la esperantisto Francisco Azorín Izquierdo.

Inter la ekspoziciaĵoj estis pluraj aludoj al lia esperantista aktivado, kiel organizanto kaj kiel verkisto de du vortaroj, unu ĝenerala kaj alia pri arĥitekturo (detaloj pri lia aktivado kiel verkisto estas legeblaj hispanlingve en la retejo de José María Rodríguez Hernández, el kie verŝajne estis prenitaj diversaj informoj aperantaj en la ekspozicio)

[http://es.geocities.com/azorin\\_esperanto/index.html](http://es.geocities.com/azorin_esperanto/index.html)

## Antonio del Barrio



Pli detala vido de la panelo pri Francisco Azorín Izquierdo en la ekspozicio pri ekzilitaj hispanaj arĥitektoj

Esperantistoj ekskursis al la Madrida Montaro kaj al Cuenca. Foto Juan Trenado



## Kantabrio



KantEA-anoj ĉeestas prezentadon ĉe la Ekoparko de Argoños



jen angulo de la KantEA ejo kun la du novaj vitrinoj

Fotoj Miguel Gutiérrez



# Valencia-Murcia Kongreso

La 28an de Aprilo de 2007 en “Burriana” (Castellón) organizita fare de la Kasteljona Grupo kun la helpo de la Valencia Grupo, ni partoprenis la 18an Kongreson de Esperanto de la Valencia Komunumo kaj Murcio.

Je la 9:00 horo komenziĝis la disdonado de la kongresa dokumentaro (bela pakaĵo de turisma informado pri Burriana kaj programo) disdonata de la turisma ĉefo Juan Llido. Ankaŭ akompanis la afiŝo “Burriana la teua mar” (Burriana via maro) tradukita al Esperanto por ĉi tiu okazo, helpe de Francisco García.

Oni preparis la ekspozicion de Afiŝoj Esperantaj, de VEF (Valencia Esperanto Federacio), HEF kaj Internaciaj. La kantisto “Luhg Palons” poluris siajn lastajn kantojn, elektitajn el la miloj kiujn ni havas en Interreto. Dume, Francisco García komencis la prelegon pri Kosmobiologio, kiu estis tre interesa. La ĉefkuiristo Francisco Conejero kun la helpo de Inés, sia edzino, kuiris ekologian paeljon kun la varia kortabirdo, kiu estis tre bongusta. Oni akompanis ĝin per minerala akvo kaj vinbera suko de la kooperativo de Cheste. Partoprenis kvindek kunmangantoj.

Je la 15:00 horo, en la estrarkunsido de VEF partoprenis: la prezidanto Miguel Ángel Bernabeu

(Alicante) Pascual Pont, José Añó, Pérez Sempere, Juan Antonio Jiménez de (Valencia), Francisco García (Cheste) Francisco Conejero (Castellón), Jesús de las Heras (Murcia) inter aliaj.

Je la 17:00 horo alvenis la Kultura Magistratano sinjoro José Ramón Calpe kaj la Juna magistratanino Ana Montagut. Oni montris al ili la afiŝan ekspozicion kaj ankaŭ unu el la plej gravaj esperantaj kursoj ene de Interreto, en 26 lingvoj, la paĝoj de la kurso montritaj en la muro okupis tri kvadratajn metrojn.

Je la 17:30 okazis la Malfermo de la Kongreso. Calpe dankis al VEF la elekton de Burriana por tiu renkonta celebrado. La Kultura Magistratano memorigis pri la blinda musikprofesoro de Burriana Pasqual Rubert, kies nomon havas nun la municipa musiklernejo kaj instruis multajn junajn lernantojn, inter ili Calpe mem, kiu estis esperantisto “kaj en tiu tempo li donis al ni, al la junuloj de tiu epoko, la ideon de la universaleco kaj frateco, kiuj estas en Esperanto”.

Multaj el la junuloj kiu formis tiun etan grupo, laŭ Calpe, dediĉis sian vivon al la politiko. Tamen, José Ramón Calpe asertas, ke la politiko devas esti alvoko al servo, “markita de la nobleco kaj la idealoj por plibonigo de la socio, en kiu

paĝo 10 →

# Historio de ESTO

Dum tiu ĉi jaro 2007, Esperantista Societo de Tenerifo (ESTO) festas sian 50an datrevenon. Ne estas nun la momento rakonti la komencojn de la Esperanto-movado en Tenerifo kaj Kanariaj Insuloj. Ni pluku liniojn el la protokoloj de la unuaj kunvenoj kiuj en 1957 kondukis al la fondiĝo de nia klubo. La lokoj, la homoj, ĉio rondiras ĉirkaŭ la Universitato de La Laguna. Preskaŭ ne necesas diri, ke Juan Régulo Pérez estas la kerno de tiuj agoj. Post la hispana milito, en la Universitato de La Laguna li instruis esperanton en la kadro de la Instituto de Lingvoj.

La 16an de februaro de 1957, en la kunsid-salono de la Fakultato de Filozofio kaj Letroj, prezidataj de la dekanano mem, kunvenis 26 homoj partoprenintaj en la kurso de la Instituto. Estas surprize konstati ke ĝuste duono el ili estas virinoj. Abundas la instruistoj. Ni elstarigu kelkajn nomojn el la listo de partoprenantoj:

-Juan Régulo Pérez. Akademiano de Esperanto. En tiu momento li estis profesoro de Romanika Lingvistiko kaj ankaŭ instruas esperanton en la Instituto de Lingvoj.

-Elías Serra Ràfols. Prezidas la kunvenon. Li estas profesoro de Historio, Dekano de la Fakultato de Filozofio kaj Letroj, kaj eksvicrektoro de la Universitato.

-Jesús Maynar Duplá. Profesoro de Biologio en la Fakultato de Sciencoj. Eksdekano de tiu Fakultato kaj eksrektoro de la Universitato.

-Mercedes Machado y Machado. Licenciulo pri ĵuro, Filozofio kaj Letroj. Instruisto en Meza kaj Baza Lernejoj.

-María del Carmen Pérez González. Licenciulo en Filozofio kaj Letroj kaj instruisto en tiu Fakultato.

-José Roberto Vivas y Vivas. En tiu momento li estis la Konsulo de Venezuelo en Kanariaj Insuloj. Endas diri, ke en tiuj jaroj de amasa elmigrado al la frata Respubliko, venezuela konsulo estis influa kvazaŭ vicreĝo.

Kune kun tiuj gravuloj, eminentaj figuroj de la kultura vivo tiutempa, ariĝis studentoj, bazlernejaj instruistoj, funkciuloj, modestaj laboristoj...

Kaj kion ili faris en tiu historia kunveno? Juan Régulo Pérez parolis pri la neceso doni leĝan karakteron al la Esperanto-Movado en Kanarioj. Ne mankos lokoj por la kunvenoj: Studenta Kolegio pretas disponigi ejon. Li prezentis al la kunvenintoj projekton de Statutoj por la ĝermanta klubo, kiu estis pridiskutata kaj akceptata kun ĝenerala aprobo.

Pli grava estis la kreado de Agenta Komisiono, prezidata de S-ro Vivas, por

redakti definitivan statuton kaj prezenti ĝin al la lokaj Aŭtoritatoj, cele al leĝa agnosko de la klubo. Fine, kun iom da troa entuziasmo, la prezidanto de tiu unua kunveno deklaris fondita la Esperantistan Societon de Tenerifo. Tamen, restis monatoj por la vera fondiĝo de la klubo, la 17an de aŭgusto. Dum tiu interakto la burokrata maŝino devis studi la statutojn.

La sorto volis, ke S-ro Vivas estu sendata al Napolo. La 28an de aprilo okazis kunveno, en la neplibonigebla kadro de konata kampara restoracio, en kiu oni volis omaĝi kaj adiaŭi S-ron Vivas. Parenteze, parolis la sekretario de la Agenta Komisiono por sciigi, ke la statutojn ili definitive verkis, kaj prezentis al la ĉiopova Provincestro, la 26an de februaro. Neniu respondo ĝis tiu tago.

Rakontas la protokolo, ke kelkaj samideanoj alparolis S-ron Vivas por danki liajn konstantajn strebadojn por vigligi la movadon, lian entuziasmon, lian sindonan kunlaboradon en ĉio rilata al nia lingvo. S-ro Régulo proponis lin kiel unuan Prezidanton de ESTO, kaj oni tion decidis per aklamo. S-ro Vivas akceptis tiun nomumon kaj emocie

José Luis Cruz

Ret-listo por esperantistoj en la  
Kanariaj Insuloj: [groups.yahoo.com/  
group/esperanto-canarias/](http://groups.yahoo.com/group/esperanto-canarias/)

---

→ de la paĝo 8

ni vivas”. La Magistratanoj donis al la lernantoj de la baza kurso de Esperanto, la 25an de aprilo, la libron de la vivo de Zamenhof tradukita al la hispana lingvo fare de D-ro. Julio Tarin. La prezidanto de VEF, José Miguel Bernabeu, donis du dokumentojn, en DIN A 3 -formato, kun demandoj kaj respondoj en Esperanto kun la bona intenco helpi al la hospitalaj pacientoj, tradukitaj en la Lernejo “Primo de Rivera” de “Callosa del Segura” donataj de la geflegistoj de la Ruĝa Kruco de Burriana, ankaŭ donis diskedon kun Esperantaj retadreso, ĉefe “esperanto.es” por konsulti la vortaron de Fernando de Diego.

Tuj poste, samideano Pascual Pont, prelegis pri la interesa kunligo de Ekologio kaj Esperanto. La gekantistoj, Luhg Palons kaj Sonia Atenea, kunlabore kun Jesuo las Heras kaj ĉiuj partoprenantoj kantis: *Hieraŭ, tra la universo, blovas la vento, Esperanto, la gajaj tempoj, la gusto de salo, dankon a la vivo, vortoj de amo, kun vi lernis mi, kisu mi multe, kaj mi amas ŝin.*

Fine oni fermis la 18an Kongreson de VEF kaj Murcio, post fari oficialan foton de la gepartoprenantoj, ili adiaŭis nin, dume en la strato pluvegis.

José Año

# Kio okazis en Palos?

De la 5a ĝis la 8a de julio okazis nia kongreso, ĉi-jare kune kun la andaluzia. Ĉe la placo Pilar Pulgar staras maldekstre la kulturdomo de Palos kiu transformiĝis por kvar tagoj en nian kongresejon.



Granda afiŝo anoncanta la kongreson

La ĉefan organizan laboron faris Rafael Mateos, José Roldán, Julio Herrero, Mariló Torres kaj José María Rodríguez (kiu okupiĝis pri la kongreslibro, la memor-tabuleto, la eldonado de la libro omaĝe al s-ano Alfonso Escamilla, memoraj bulkraĵoj, ŝlosil-ringo, ktp)

La unuan tagon dum-matene, oni disdonis la materialon donacitan de la magistrato, enhavanta insignon de la vilaĝo, broŝuron en esperanto pri la historio de Palos, tradukita de Andrés Martín, la ŝlosil-ringon, aliajn broŝuretojn pri Palos kaj t-ĉemizon ornamitan de verda stelo kaj teksto rilate al la Kongreso.

Per senpaga aŭtobuso, ĝentilaĵo de la Urbodomo, la plimulto de la kongresanoj veturadis por tagmanĝi al bona restoracio kontraŭ malalta prezo.

Je la 17a horo okazis la inaŭguro de la Kongreso kun ĉeesto de la afabla urbestro kaj de la magistratanino pri Kulturo. La urbestro kaj la prezidantoj de HEF kaj AEU partoprenis en la inaŭguro, kiu estis filmita de la loka televido. Kelkaj eksterlandaj partoprenantoj koncize sin prezentis: Francisko Simonet, Paulo Branco, Grazina Opulskienie, Zlatko Tišljar, kiu invitis nin al la kongreso de EEU en Maribor, kaj Roman Dobrzynski, kiu laŭtleĝis leteron de L. C. Zaleski-Zamenhof.

Libroservo estis malfermita la tutan kongreson, ofertante grandan buntan da libroj kaj k-diskojn, prizorgata de Pedro Sanz

## Prelegoj

Francisko Simonet prezentis sian prelegon “Liberon por la lingvoj” kie li emfazis la gravecon konservi kaj respekti ĉiujn minoritatajn lingvojn kaj prezentis la asocion “Liberon por la lingvoj” (liberoporlalingvoj.cjb.net). Poste li mallonge prelegis pri kelkaj problemoj de la komenca esperanto-movado.

Zlatko Tišljar reliefigis la rolon de lingvo en la propra identeco kaj

konkludis ke nur per komuna neŭtrala lingvo kiel esperanto eblos eŭropa identeco. Tamen, se tio okazus, esperanto ne plu estos universala.

Grazina Opulskieniĉ, prelegis pri “La virinoj en la Esperanto-Movado”. evidentiĝis, ke kvankam oni ne memoras nomojn de multaj famaj esperantistinoj, virinoj ja havas gravan rolon, komencante per la patrino, la edzino kaj filinoj de Zamenhof.

Miguel Gutiérrez Adúriz, prezentis sian novan instruo-metodon, kiun li nuntempe provas kaj disvolvigas. Tiel, la lernado okazu intuicie, ne per libroj aŭ gramatiko. Li poste prezentis sian tre atendatan vortaron ‘Amika’.


La komputilisto José Carlos Cuevas prelegis pri la tradukado esperanten de la operaciumo Linukso (Linux), kaj pri redaktado de artikoloj en Vikipedio.

Augusto Casquero estis ĵus reveninta el Ĉinio por ĝustatempe ĉeesti la kongreson. Li projekciis fotojn kaj rakontis pri sia sperto en tiu lando.

Fabián Jiménez legis sian prelegon pri la movado, kaj poste ekis vigla diskuto en esperanto kaj hispane. (vidu paĝon 26)

## Dokument-filmoj

La pola televid-reĝisoro Roman DobrzyDski montris kelkajn siajn filmojn: “Sevilla Maravilla”, “Valencio en Fajro”, “Chopin revenas al Majorko”, “Muroj de Miljaroj” (Pri la Universal Kongreso en Ĉinio) kaj malnovan dokument-filmon pri “Bona Espero” (bieno-lernejo por malriĉaj infanoj en Brazilo, fondita de esperantistoj). La filmoj estis kreitaj por la pola ŝtata televido, sed poste dublitaj al esperanto. Multaj tiuj filmoj estis elsendataj en la malaperinta Internacia Televido. Dobrzynski havas fortan rilaton kun Hispanio kaj rakontis kelkajn anekdotojn, ekzemple pri la malfacilaĵoj kiujn li renkontis antaŭ sia unua vojaĝo al nia lando. Tiam regis la reĝimo de Franco,



Miguel Gutiérrez

kiu sukpektis pri ĉio venanta el komunistaj landoj, tamen finfine li sukcesis vojaĝi dank’al esperantistaj kontaktoj.

## Lingvaj programeroj

Abundis la okazoj por perfektigi nian scipovon de esperanto. Djorge Obradovich, el Slovenio, gvidis kurseton pri transitiveco de la verboj en Esperanto, la akademiano Francisko Simonet klarigis la uzadon de ‘si’ kaj ‘sia’, Zlatko Tišljar parolis pri la kunmetitaj

verboformoj kaj Aŭgusto Casquero klarigis la prepoziciojn. Por komencantoj, Grazina Opulskienė gvidis lecionojn per Cseh-Metodo en kiuj la komunikado okazas nur en esperanto helpe de bildoj, objektoj kaj signoj.

Ekzamenoj por niveloj baza kaj meza estis disponeblaj. Je la fermo oni disdonis la atestilojn al la sukcesaj studentoj.

### Muziko

Unu el la ĉeesto-kialoj estis certe muziko. Ĵaŭde regalis nin loka flamenka grupo, kun belaj dancistinoj kaj belsona voĉo de kantisto.

Vendrede nokte la esperanto-kantisto “Solo” koncertis en plenarea aŭditorio apud la kongresejo, prezentante siajn elektronikajn kaj ritmajn kantojn, inkludante kuriozan version de ‘La Espero’ Bedaŭrinde li estis devigata tro frue fini la koncerton, post kvardek minutoj, pro eksteraj kaŭzoj. Krom tio, li sukcese prelegis pri

esperanta-muziko.

Sabate ĝueblis la dolĉaj kantoj de ĵomart kaj Natasha, naskiĝintaj en Kazaĥio sed delonge loĝantaj en Svedio. Ilia filino Karina akompanis ilin en kelkaj kantoj.

### Kunsidoj

Ankaŭ estis tempo por pridiskuti oficialajn aferojn. HEF kaj AEU (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo) okazigis siajn respektivajn kunsidojn kaj samtempe la junulararo de ambaŭ asocioj (HEJS kaj AJEU) kune debatis.

### Turisme

Sabate estis ŝanco viziti la plej famajn vidindaĵojn de Palos, ĉiuj kun rilato al la malkovro de Ameriko. Amaso da esperantistoj vizitis senpage la ĉarman monaĥejon, kie Kristoforo Kolumbo gastis antaŭ sia foriro al neesplorita oceano. Poste oni vizitis la perfektajn replikojn de la tri karaveloj.



ĵomart, Natasha kaj Karina



Monaĥejo *La Rábida*

Dimanĉe vespere, jam ekster la oficiala programo multaj povis ŝipveturi al Punta Umbría kompleze de la magistrato kaj reveni post iom da tempo.

## Ekspozicio

Ceramikaĵoj de Francisca Alonso kaj Chata Torrades estis montrataj en apuda ejo, kun titoloj en esperanto.

## Omaĝe

Grava programero estis la “Omaĝo al S-ano Alfonso Escamilla” fare de la prezidanto de AEU, kun prezentado de la libro “Apud Centjara Oliv-arbo” kaj memor-tabuleto dediĉita al li. Neniu familiano povis ĉeesti, sed baldaŭ, grupeto da esperantistoj vojaĝos al Linares por transdoni al li persone, la donacojn kaj profiti la okazon brakumi lin.

## Konklude

Kelkaj ĵurnaloj informis pri la evento: *El Mundo* (Onuba eldono), *Odiel Información* kaj *Huelva Información*. Tamen, eble ni povas bedaŭri, ke malmultaj eksteraj homoj alproksimiĝis por demandi aŭ scivole. Ni povas kontenti pro la partopreno de junuloj kaj de eksterlandanoj (12 el proksimume 85 homoj venis de alia lando). Ni atendas vin la venontan fojon!

Jorge Pavón (kontribuis Ángel Arquillos)

## KONGRESAJ KONKLUDOJ

1. Esperanto, pro sia neŭtrala karaktero, povas havigi lingvan identecon al la parolantoj de la Eŭropa Unio, respektante la rajton de ĉiuj lingvoj kunekzisti en plano je egaleco. Ni daŭrigos niajn strebojn por antaŭenigi sian uzadon kaj agnoskon.

2. La novaj teknologioj, ĉefe interreto, revoluciigas la esperantismon, kaj antaŭenpuŝas la diskonigon de Esperanto inter la junularo el la tuta mondo. Oni devas plilarĝigi la uzadon de ĉi tiuj teknologioj.

3. Ni lanĉas la ideon okazigi denove Universalan Kongreson en Hispanio

## Nova vortaro!

Miguel Gutierrez Adúriz jam prezentis provizoran vortaron en 2002 por ŝtopi la mankon de moderna vortaro, problemo graviĝinta post la bankroto de la eldonejo ‘Sopena’, disvendantoj de la konata ‘Lexicón Sopena’ kaj la sekva provizora konfisko de ties havaĵoj. La nova vortaro ‘Amika’ estas jam definitiva kaj volas esti fidela akompananto de ajna hispanlingva esperantisto.



# Renato Corsetti salutas la Kongreson

Karaj partoprenantoj de la 66-a Hispana Kongreso de Esperanto,

La organizantoj de via kongreso havis la ĝentilecon peti min sendi al vi salut-vortojn, kaj pro tio mi dankas ilin.

Mi volas diri al vi, karaj hispanaj esperantistoj, ke mi vere ŝatus esti kun vi en Palos de la Frontera. La nomo mem de tiu urbo sonas tute fascine je itala orelo. Ne ekzistas io pli hispana ol tio.

Mi kredas, ke ĝuste en Palos indas citi kamparanan proverbon el mia vilaĝo: “Kiu volas, iru. Kiu ne volas, sendu!” Alivorte kaj pli malkoncize: “Kiu volas [ke io efektive okazu], iru [mem]. Kiu ne volas [ke io okazu], sendu [iun alian]!”. La dua parto samas je la konata politikista diro: “Ni starigu komisionon!”, kiam oni ne volas solvi problemon.

Iam estis iu en Palos de la Frontera, kiu tamen decidis iri mem, por vidi ĉu ŝipante okcidenten oni alvenas al la Oriento. Tiaj homoj ŝanĝas la iron de la historio.

Ankaŭ Zamenhof decidis ne atendi aliajn sed mem krei internacian lingvon kaj vidi, ĉu ĝi funkcias en la realo.

Sed kiel tiu proverbo rilatas al Esperanto kaj al ĉi tiu kongreso? Ĝi rilatas al la laboro por Esperanto, ĉar nia

laboro, de vi, de mi, kaj de ĉiuj esperantistoj en la mondo estas konigi Esperanton al la mondo kaj instrui ĝin, kaj samtempe ade reaserti, ke ne estas juste, ke en la kampo de lingvoj kaj kulturoj validu la tiel nomata ĝangala leĝo, pro kiu la granda lingvo englutas la malgrandan; ĉio cetera sekvas el tio.

Tio estas la laboro de ni ĉiuj, de la simplaj esperantistoj. Ni faris ĝin dum jarcento kaj ni plufaros ĝin, dum aliaj parolados pri ĝi.

Do ni mem, ne iu alia, devas porti al la mondo la mesaĝon de frateco kaj justeco de Esperanto. Ni ne povas esperi je politikistoj, je UN aŭ je la Eŭropa Unio. Ili povas helpi sed ni mem devas fari la laboron. Zamenhof mem diris, ke tiaj homoj kaj instancoj helpas nin, nur kiam la helpo ne plu estos bezonata. Tion mi ade rediras al ĉiuj, kiel tiuj maljunuloj, kiuj jam perdis sian prudenton kaj ĉiam parolas nur pri unu afero.

Tamen por ne ŝajne komplete reinfaniĝinta, mi aldonu duan aferon.

Ni sekvu la komunan prudenton en nia agado. Tio, en kelkaj landoj, havas la nomon “kamparana saĝo”, kaj kamparana saĝo estas la sama tra la tuta mondo, kaj en Finnlando kaj en Ĉinujo kaj en Hispanujo.



La tasko disvastigi Esperanton estas tiom vasta, ke oni bezonas ĉian agadon, kaj sekve oni devas esti tre tolerema pri la agadoj de aliaj. Tio, kio ne funkcias, estas kiam oni akcentas nepre unu aferon, kaj nur tion. Ni fakte bezonas ĉion. Kiel ni povas konstati, ekzemple en Ĉinujo, ili havas kaj altrangajn politikistojn, amikojn de Esperanto, kaj vastan popolan esperantistaron. La du aferoj estas necesaj kune, unu sen la alia ne funkcias. Tio validas same en ĉiu mondo-parto. Mi diras, ke ni ne risku ĉiun niajn ŝancojn sur nur unu karto.

Estas kelkaj homoj, kiuj nur volas disvastigi Esperanton ĉe la bazo, al aliaj normalaj homoj. Tiuj estas la tiel nomataj “desubistoj”, kiuj iras la suban vojon.

Aliaj volas disvastigi Esperanton per konvinkado de parlamentanoj, ministroj, eŭropaj parlamentanoj, ktp. Ju pli alte des pli bone. Tiuj estas la tiel nomataj “desupristoj”, kiuj iras la vojon «supran».

Aliaj volas disvastigi Esperanton per vojoj flankaj, per konvikado de sciencistoj, lingvistoj, teknikistoj, kiuj siavice konvinku la politikistojn. Tiujn mi nomas «deflankistoj».

Mi simple asertas, ke devas esti ekvilibro inter tiuj tri vojoj, ke oni devas iri ilin ĉiujn samtempe. Certe unu individuo povas ŝati nur unu el la tri

agadoj. Alia povas esti kapabla nur pri unu el la tri. En ordo. Tio, kio ne estas akceptebla, laŭ mi, estas ke organizaĵoj lanĉu sin en nur unu el tiuj vojoj. Organizaĵoj devas esti ekvilibrataj, ili devas praktiki “ekvilibrismon”. Tio validas en ĉiuj kontinentoj kaj ankaŭ en Hispanujo.

Ne havu iluziojn, ke EU konvinkiĝos pri Esperanto, se oni ne devigos ĝin konvinkiĝi pro la ekzisto de multaj esperantistoj. Partoprenu trankvile la agadon de Eŭropa Esperanto-Unio, ties kampanjojn, kaj en la fino ni sukcesos konvinki eĉ la eŭropajn burokratiulojn, ke justeco estas pli bona ol favorado de la fortulo de la momento ankaŭ en la kampoj lingva kaj kultura.

Sukceson al la 66-a Hispana Kongreso de Esperanto!

Renato Corsetti

---

## Historia Libro

Antonio Marco Botella, konata esperantisto kaj multjara redaktoro de Boletín, prezentis historian libron en la hispana, kie li rakontas personajn memorojn de sia ekziliĝo post la



Hispana Intercivitana Milito. La titolo estas :“La odisea del Stanbrook. Memorias de un exiliado político” (“La odiseado de la *Stanbrook*. Memoroj de politika ekzilito”)

# Gimnazioj en Eŭropo konatiĝas dank'al esperanto.

De la 14a ĝis la 21a de aprilo kelkaj instruistoj kaj lernantoj de la mezlernejo “Reyes Católicos” en la aragona urbeto Ejea de los Caballeros troviĝis en Polski Trambesh (Bulgario), Tie ili renkontis la aliajn partoprenantojn de la projekto AKEL 2 (dua grupo de AKEL), kadre de la programo Comenius de la Eŭropa Unio. La kunordiganto estas Eŭropa Esperanto-Unio .

La ĉefa celo de AKEL (Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj) estas disvastigi esperanton kiel tutmondan komunikilon, kaj samtempe ebligi kulturen interŝanĝon kiu povu grandigi la viv-horizontojn . Por tio, la geknaboj de la engaĝitaj lernejoj antaŭe ricevas esperanto-kurson kaj tiel ili povas ĝui aktivaĵojn en tiu lingvo kaj

rilati senpere kun la alilandaj lernantoj.

La renkontiĝo kunigis instruistojn kaj lernejanon de Modemo (Italio), Gloucester (Anglio), Litovio, Ejea de los Caballeros (Hispanio) kaj la bulgaraj gastigantoj de la mezlernejo de Polski Trambesh. La junuloj vizitis Sofia, Veliko Tarnovo, kaj la Monaĥejojn de Troyan kaj de Rila. La diversaj lernejoj prezentis videofilmojn, lumbildojn kaj laboraĵojn pri siaj landoj, precipe pri tradicioj kaj regionaj vestaĵoj.

La grupo AKEL 2 jam sendis studentojn en 2005 al Bulgario, kaj en 2006 al Modemo kaj Gloucester.

Pli da informo: [www.lingvo.org/akel/](http://www.lingvo.org/akel/)



La studentoj pozas dum ekskurso en Bulgario. Foto [www.ejeadigital.com](http://www.ejeadigital.com)

# Sporto kaj esperanto kunigas kulturojn

Esperanto, kiel internacia lingvo utilas por ekigi kontaktojn pri tre diversaj aferoj; ofte inter homoj de malsamaj kulturoj. Jen sekvas ekzemplo de tio:

La 12an de junio, en la ĉina urbo Fuzhou (5 milionoj da loĝantoj) oni solenis oficiale la starigon de rilatoj inter la piedpilka teamo CD Tortosa en Katalunio kaj samnoma klubo ĵus-kreita en Ĉinio. La klubo de Fuzhou havas futbal-lernejon kun 800 instruatoj. Alia samnoma klubo jam fondiĝis en Kantono. Estas grandaj eblecoj por krei futbal-lernejon en Tortosa kun 20 knaboj kiu lernos futbalon, hispana lingvon kaj kulturon.



La studentoj pozas antaŭ afiso en la ĉina kaj esperanto

Ĉe la inaŭguro estis ĉefaj aŭtoritatoj lokaj kaj provincaj. Augusto Casquero, prezidanto de nia asocio, estis invitita al la celebrado. Li tiutempe troviĝis en Kantono, instruante la hispanan al junuloj kiuj veturos somere al futbal-lernejo de Tortosa. Ankaŭ ĉeestis Sr-o Hu, Xu, instiganto de tiu

kunfratiĝo. La inaŭguron eĉis abunde ĉinaj amaskomunikiloj kaj HEF sendis sciigon al la hispanlingva gazetaro.



malkovro de mur-ŝildo kun skriboj en la ĉina kaj la hispana.

La rilatoj inter la hispana kaj la ĉina kluboj komenciĝis en 2005. Manel Vinyas, aŭtoro de 'Kun esperanto en la Tornistro' unue kontaktis kun Hu Xu dum sia vojaĝo la antaŭan jaron ĉirkaŭ la mondo en 79 tagoj. En 2005 tri ĉinaj knaboj (Hu Nan, Cai Wei kaj Huang He) aniĝis en la Tortosa klubo por plibonigi sian teknikon kaj lerni la hispanan. Ili aperis en programo de la radio RAC-1. La ĵurnalisto faris la demandojn katalunc kaj la knaboj respondis en esperanto. La e-isto Ferriol Macip tradukis al ambaŭ lingvoj.



Dum la radia intervjuo en 2005 (foto F. Macip)

# Europaio, nova provo forigi Babelon

De tempo al tempo aperas nova projekto de planlingvo. Ĉi-foje ni dediĉas nian atenton al ideo disvolvigita en Hispanio, pli konkrete en Ekstremaduro iniciata de la junaj studentoj pri lingvistiko Carlos Quiles kaj María Teresa Batalla al kiuj aldoniĝis du profesoroj de la Ekstremadura Universitato, spertuloj pri biblioteka laboro, ekonomio kaj du britaj filologoj. Temas pri Europaio, kiu estas bazita en rekonstruita pra-Hindoeŭropa, konsiderata komuna bazo de granda parto de la nunaj lingvoj: la ĝermanaj (angla, germana, ...), latinidaj (franca, hispana, ..), slavaj (Pola, Serbo-Kroata..), hindoiranaj, ktp. En Eŭropo sceptas la lingvoj finna, hungara, eŭska kaj estona.

## Ne kiel esperanto

Malgraŭ ŝajna simileco kompare kun nia esperanto estas tamen grandaj diferencoj:

Europaio, laŭ siaj kreantoj estas lingvo celita nur al eŭropanoj, kun la

espero ke ĝi iam fariĝos komuna kaj oficiala komunikilo, kompreneble sen forpuŝi la propran lingvon. Ankaŭ ne troviĝas tiuj idealoj kiuj inspiris al Zamenhof, ne estas intenco finigi la dividon inter gentoj. La nova lingvo prezentas sin nur kiel praktika ilo.

La alia granda diferenco troviĝas en la strukturo de la lingvo mem. Malkiel en esperanto, facileco ne estas grava principo, unu la kreintoj mem deklaris ke “Europaio estas kvazaŭ malfacila latino”, ekzemple, ekzistas pluraj kazoj kaj deklinazioj. Temas do pri naturalisma projekto, kiu klopodas imiti ‘nature’ lingvon, kaj ĉi-foje rekrei la pra-Hindoeŭropan.

## Eŭro en televido

Raportetoj pri Indoeŭropaio aperis en ambaŭ kanaloj de la ŝtata televido, kaj la kreintojn oni intervjuis. Estas kelkaj mencioj pri Esperanto, ne tro ĝustaj kiel ofte okazas. La raportoj estas videblaj en [youtube.com](https://www.youtube.com)



EU jam havas komunan valuton.  
Kiam komuna lingvo?



malgranda. Paroli pri granda nombro de Esperantaj gazetoj estas surbaze de tio iom fanfara, kvankam foje ankaŭ naciaj Esperanto-gazetoj estas gravaj kaj influaj. Eĉ la unua gazeto en Esperanto, *La Esperantisto*, estis komence legata plejparte en Ruslando, kie plimulto de esperantistoj vivis en tiu tempo.

Esperantaj gazetoj kutime silentas pri siaj eldonkvantoj. Laŭdinda escepto estas UEA, kiu publikigas ekzaktajn nombrojn, kaj *La Ondo*, kiu estas devigata publikigi tiun informon surbaze de Rusia leĝo. La abonkvantoj estas magraj: *Esperanto* 4084 abonantoj, *Kontakto* 922, *La Ondo* 545. Kaj tiuj ĉi apartenas al la plej disvastiĝintaj gazetoj. El la aliaj eble nur *Monato* atingas la similan nivelon; pri *Literatura Foiro*, *Heroldo* kaj *Fonto* ne uzeblas eĉ bonaj pritaksoj.

Disvastigo de informoj pri ekzisto de bonaj Esperanto-gazetoj estas problemo, kiun multaj redaktistoj pripensas tro malmulte. Ekzemple mi ne vere konsciis pri la ekzisto kaj kvalito de *Fonto* dum pluraj jaroj, kvankam mi sciis, ke tia gazeto ekzistas. Se mi sciintus, ke en ĝi aperas gajnintoj de belartaj konkursoj kaj pluraj aliaj interesaj artikoloj, mi estus aboninta ĝin eble dek jarojn pli frue. Kaj mi ne estas unu el la plej malinformitaj esperantistoj...

Inter internaciaj nefakaj gazetoj plej elstaras la movadaj kaj kulturaj

gazetoj. Movadaj tendencas esti organoj de asocioj, kiel revuo *Esperanto*, eble la plej disvastiĝinta gazeto dum la tuta historio de Esperanta gazetaro. Inter aliaj organoj, ekzemple, *Sennaciulo* kaj *Sennacieca revuo* havas brilan historion. Ankaŭ kulturo estas unu el fortaj flankoj de internaciaj Esperanto-gazetoj. Inter la plej brilaj gazetoj estis tiuj, kiuj okupiĝis plejparte pri kulturo: *Literatura Mondo*, *La Nica Literatura Revuo*, *Literatura Foiro*, *Fonto*...

Malmultaj Esperantaj gazetoj temas plejparte pri nemovadaj kaj (ne Esperantaj) kulturaj aferoj. Pli frue unu el tiaj gazetoj estis *Kontakto*, sed ekde 1979 *Monato* estas la plej brila inter ili. *Monato* faris de la komenco tion, kion kelkaj nacilingvaj gazetoj eksperimentis nur poste: nome, la lokaj ĵurnalistoj kutime konas la lokajn aferojn pli bone ol t.n. “paraŝutaj ĵurnalistoj”, kiuj venas al “varmegaj punktoj” nur kiam “okazas io” kaj ofte misinformas pli ol informas. *Monato* realigas la idearon de esperantismo: respekti la lokan kaj kunigi la lokan kun internacia nivelo. Necesus plifortigi la ekzistantajn kaj bone funkciajn gazetojn kaj eble rezigni pri kelkaj tro marĝenaj: pluraj artikoloj, ekzemple, de *Etnismo* povus havi pli grandan legantaron en *Monato*.

Kiu(j) faras la gazetojn

Eble 90% el Esperanto-gazetoj estas realigitaj per unuopaj redaktoroj entuziasmuloj. Nur malmulto havas

ĵurnalisman edukon, sed en tio ili ne multe diferencas je, ekzemple, finnlandaj ĵurnalistoj, el kiuj nur duono havas ĝuste ĵurnalisman edukon.

Redaktoroj-entuziasmuloj povis certigi aperadon de gazetoj, eĉ kiam tio ne estis profitdona aŭ eĉ ne kovris la kostojn. Tamen pro la sama kialo nur en tre maloftaj kazoj okazis, ke internacie disvastiĝinta Esperanto-gazeto sukcesis transiri de unu redaktanto al alia. *Norda Prismo* estis kreaĵo de Ferenc Szilágyi, kaj ĝi kolapsis kelkajn jarojn post la morto de la fondinto. *Fonto* estas kreaĵo de Gersi Alfredo Bays kaj *La Ondo de Esperanto* de Korĵenkov kaj Gorecka; kaj apenaŭ imageblas, ke iu alia povus transpreni la redaktadon. Malmultaj sukcesaj ekzemploj estas *Lingvo Internacia*, kiu havis tri redaktorojn inter 1895 kaj 1914, kaj *Heroldo de Esperanto*, kiu jam havas la kvaran redaktoron. Tamen la rolo de *Heroldo* lastatempe ŝanĝiĝis. Ankaŭ *Monato* sukcese transiris de unu redaktoro al nova skipo, kvankam la unua redaktoro ankoraŭ restis en la kunlaborantaro.

Gazetoj de diversaj organizoj havas pli fortan daŭripovon, ĉar la organizo garantias la aperon, kvankam foje estus problemoj trovi novan redaktoron. Tiel ankaŭ la naciaj Esperanto-gazetoj estas inter la plej vivodaŭraj. Indus menci, ekzemple, la svedan *La Espero*, fonditan jam en 1906. Inter internaciaj gazetoj plej malnovaj estas la religiaj *Dia Regno* (1908) kaj *Espero katolika* (1906).

## Utilo de la sendependa gazetaro

“Sendependa gazetaro estas utila por demokratio” estas slogano de la posedantoj de privataj komercaj gazetoj. En Esperanto tiaj gazetoj preskaŭ ne ekzistas, kvankam kelkaj gazetoj sukcesas financi sin mem. Sendependaj gazetoj estas maloftaj, sed ankaŭ ili ekzistas. *Heroldo de Esperanto* estis tia, kiam ĝin redaktis Teo Jung kaj Ada Fighiera-Sikorska. *Eventoj* estis tia: mi memoras la malplenajn angulojn, kie devis aperi respondoj de tiuj estraranoj de UEA, kiuj ne respondis al la demandoj de la gazeto. *Libera Folio* kaj ankaŭ *La Ondo* plu portas la torĉon de sendependeco.

Estas nenio nova ankaŭ en rilatoj inter la estroj kaj la redaktoroj. Lapenna kritikis *Heroldon* en 1964 jene:

*La redaktoroj de la t.n. “sendependaj” periodaĵoj respondecas al neniu krom al si mem. Se ili komprenas sian sendependecon kiel ian rajton publikigadi tendencajn malĝustaĵojn aŭ misrepresentajn artikolojn, tiam ili misuzas la principon de preslibereco kaj transformas sian sendependecon en senrespondecon*

(*Esperanto*, 1964, 7–8, paĝo. 125)

Karakterize, ke ĉiam por prezidantoj kaj potenĉavuloj estas plej facile scii, kio estas misrepresentado kaj

kio malĝustaĵo. Ne dependi de iu alia ol la redakcia prijuĝo estas grava. Fakte tiaj gazetoj dependas de legantoj, kiuj finansas ilian aperon. Ili ankaŭ ne dependas de organaj devoj, kiuj tamen povas esti interpretataj tre diversmaniere: organo ja povas singarde sekvi la oficialan linion de la estroj, sed organo povas ankaŭ pli vaste orientiĝi al la membraro de iu organizo kaj reprezenti membraran volon, foje eĉ kontraŭ la estraro.

Same kiel Lapenna kritikis *Heroldon* en la 1960aj jaroj, la gvidantoj de nuntempaj Esperanto-organizoj sentas sin malfacile kiam la gazetaro malkovras, ke la realo ne estas same brila ol ili mem imagas. Tamen la tasko de Esperanta gazetaro ne estu kontraŭstari Esperanton mem kaj la organizojn kiuj strebas ĝin utiligi. Malgraŭ tio, por simplaj esperantistoj estus pli bone, se la stultaĵoj estus malkovrataj en la propra rondo antaŭ ol ili detruas la renomon de Esperanto ĉe aliuloj. Sendependeco estas utila kaj inda eĉ ankaŭ en movadaj organoj. Same kiel en gazeto de politika partio, en Esperanta organo devus aperi ankaŭ kritikoj kontraŭ la gvidantaro, se estas kialo por tio. Necesus ke la plej bona informanto pri aferoj de la propra asocio estas la propra organo, ankaŭ tiam, kiam temas pri malagrablaj aferoj.

### Ne plu ŝtata financado

Iom bedaŭrinda fenomeno estas, ke la internaciaj gazetoj financitaj de la ŝtatoj, en kiuj ili estis eldonitaj,

malaperis post la komenco de 1990aj jaroj. *Hungara vivo* kaj *El Popola Ĉinio* estis inter plej disvastiĝintaj Esperantaj gazetoj. *El Popola Ĉinio*, kiel malmultekosta kaj interesa revuo, estis mia unua regula legaĵo en Esperanto. Ne plu estas politika bezono por tia publikado en Esperanto, kaj ankaŭ ne multe en iu alia lingvo. Same malaperis, ekzemple, finnlingvaj gazetoj pri GDR aŭ Soveta Unio. Nu, malaperis ankaŭ tiuj ŝtatoj. Iusence ankaŭ la minaco pri nuligo de Esperantaj elsendoj de Pola Radio apartenas al la sama fenomeno.

### Gazete aŭ/kaj rete?

Estonteco de la gazetaro meditigas ne nur esperantistaron. Ie la gazetoj iradas en la reton. Por multaj gazetoj retaj solvoj ĝis nun estas eksperimentoj, ili ne portas profiton, sed eble ankaŭ ne forprenas tradician cirkuladon. Ĉu la reta eldonado forprenas la publikon el la paperaj gazetoj? Eventuale jes, sed mankas veraj esploroj pri la afero (ankaŭ nacilingvaj gazetoj hezitas pri la respondo). Aperigi parton (aŭ eĉ tuton) el materialo en la reto, eble iomete malpli frue ol aperas la papera gazeto, povus funkcii ankaŭ kiel reklamilo por la papera eldono. Nuntempe ankoraŭ (eble ĝis eterno) pli facile legi el papero ol el ekrano kaj reta eldonado ne kontentigas tiujn, kiuj havas rimedojn aboni paperajn gazetojn. Mi supozas, ke nur tre malmultaj abonis gazetojn en la reto, malgraŭ signife malplikosta kotizo. La risko por eldonantoj tamen estas, ke la



retaj gazetoj disvastiĝus senkoste en la reto. Teknike ja eblas enmeti distingilon, kvazaŭ la adresetikedon, sur pdf-dosieron, kiu indikas, kiu elretigis la gazeton por si.

Pro interreto multaj esperantistoj estas pli bone informitaj pri movadaj aferoj ol antaŭe. Malantaŭ-kurtenaj ludoj pri elektoj malkaŝiĝas pro malatente sendita retmesaĝo al publika listo, ajnaj sekretoj facile fariĝas publikaj. Pensu nur, se la reto estus ekzistinta jam en 1974.

Ankaŭ por reta gazeto la redakta laboro estas grava. En la reto eblas trovi amason da materialo. En tia situacio eĉ pli gravas, ke iu elektas, kombinas, kolektas kaj prezentas la materialon en formo, kiu ne estas tro temporaba por leganto. Dum la reta eldonado fariĝas pli ofta, necesas eĉ pli da profesieco en ĵurnalisma laboro. Tamen en la reto ankoraŭ maloftas pagaj servoj kaj igi Esperantan gazeton finance daŭripova en la reto povas esti eĉ malpli facile ol sur la papero.

Necesus pli eniri la reton, aparte kiam temas klare pri neprofitdonaj gazetoj. Ekzemple en la reto jam ekzistas multege da nacilingva scienca materialo senpage, ofte en aliaj lingvoj ol la angla. La anglalingvaj sciencaj revuoj devigas uzantojn (kutime universitatajn bibliotekojn) pagi, sed rusaj, hispanaj,

portugalaj ktp. estas ofte senpagaj. Necesus fondi bonkvalitajn sciencajn retajn gazetojn, ĉu surbaze de *Scienca Revuo*, ĉu sendepende de ĝi. La reto povas doni novan vivon al iamaj gazetoj: necesus enretigi malnovajn jarkolektojn kaj ebligi konsultadon de ilia enhavo.<sup>1</sup> Eble en tio estus taŭga celo por iu ekzistanta fondaĵo aŭ loko por nova fondaĵo. Tekniko ekzistas, skanemuloj troviĝas en malmultekostaj landoj, retejoj haveblas eĉ senpage.

Jukka Pietiläinen. Originale publikigita unue en La Ondo de Esperanto n-ro 4. 2007



*Jukka Pietiläinen estas esploristo en la departemento pri ĵurnalistiko kaj amaskomunikado en la universitato de Tampere (Finnlando). Li estas unu el tre malmultaj fakuloj pri Ruslanda gazetaro en la mondo (ekster Ruslando mem). En Esperantujo li estas konata kiel fakulo pri informado (komisiito de UEA pri tiu fako) kaj pri la Esperanta gazetaro.*

<sup>1</sup> Noto de red. Nuntempe ekzistas jam ejoj en la Reto kun tia kolekto de revuoj: gazetotokolanti.com (Boletín n-ro 377) kaj la fus-kreita gazetejo.org.

# Nobel-Premiito proponas esperanton por EU

La Eŭropa Parlamento invitis dek tri nobel-premiitojn por celebri la tagon de Eŭropo. Inter ili troviĝis la ekonomiisto Reinhard Selten premiita en 1994, kiu estas ankaŭ esperantisto.



En sia parolado, Selten rememorigis la rapidan ekonomian integriĝon de Eŭropo en la lastaj 50 jaroj, ankoraŭ ne plene realigita, kaj substrekis la gravecon de la sendependado de la Centra Banko. Tamen la ĉefa ideo de lia parolado rilatis al la lingva aspekto. Jen liaj vortoj:

“Necesas stimuli la ekeston de pli forta eŭropa identeco. La eŭropanoj devas lerni senti sin unuavice kiel eŭropanoj.

Grava malhelpaĵo sur la vojo al pli forta eŭropa identeco estas la lingvaj baroj ene de Eŭropo. Tiu lingvo-problemo postulas solvon. Neniu lingvo rajtas superregi alian. En la longa daŭro nur neŭtrala solvo estas akceptebla. Neniun nacion ni rajtas malavantaĝigi.

Facile lernebla planlingvo kiel Esperanto ebligas neŭtralan solvon de la lingvoproblemo. Duan fremdlingvon oni lernas multe pli facile ol la unuan. La dualingva efiko estas tiom forta, kaj

Esperanto tiom facila, ke estas pli favore unue lerni Esperanton kaj poste nacian fremdlingvon, ol nur tiun fremdlingvon solan. Tio estas science pruvita per lernejaj testoj.

Unue kelkaj landoj povas fari traktaton pri lerneja instruado de Esperanto. Poste oni povos vastigi tiun traktaton al aliaj landoj. La vojon de traktatovastigo oni plurfoje iris sukcese, ekzemple pri la Schengen-Traktato kaj la Mona Unio.”

## Parlamentaria seminario pri lingva diskriminacio en EU

En la unuaj tagoj de julio la liberala grupo ALDE en la Eŭropa parlamento aranĝis publikan seminarion (aŭ “aŭdadon”) pri lingva diskriminacio en Eŭropa Unio. Parolis interalie la konata esploristo François Grin. Unu el la aranĝantoj de la seminario estis Esperanto Radikala Asocio (ERA), kaj ĝia gvidanto Giorgio Pagano estis unu el la debatestroj. La aranĝon ĉeestis multaj esperantistoj, inter ili ankaŭ Renato Corsetti, la prezidanto de UEA. Esperanto tamen ne havis grandan rolon en la publikaj elpaŝoj. Ne ĉeestis la sola esperantista EU-parlamentano Malgorzata Handzlik.

el liberafolio.org (fragmento)



La prezidento de Ĉinio rekomendas lernadon de esperanto

Nuntempe estas en preparo la Ĉina Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la urbo Guangzhou (Kantono), dum la monato oktobro. Dum estrakunsido tiucele oni komentis ke la urbaj aŭtoritatuloj estas malfermaj kaj helpemaj, interalie ĉar oni montris al ili gazetaran eltondaĵon, en kiu aperas artikolo de la vizito de la Prezidento de Ĉinio, s-ro Hu Jingtao, la 21-a de decembro de 2004, kiu dum vizito al fabriko diris la jenon: “Ni ne nur bone lernu *Pu Tong Hua*, ni devas lerni Esperanton”. Kiel ĉiu scias Ĉinio estas vera lingva mozaiko. Ekzistas tie multaj lingvoj kaj dialektoj. Homoj de diversaj regionoj de apudaj urboj, parolas sian propran lingvon (dialekton). Sed ĉiuj devas koni *Pu Tong Hua*, kiu estas la oficiala ŝtata lingvo, devige lernenda por ĉiuj. Guangzhou havas sian propran dialekton, *Guangdong Hua*. Aliaj ĉinoj ne komprenas ĝin. Kaj la prezidento rekomendis dum sia parolado la pluan uzadon de *Pu Tong Hua*, kiel lingvo kiu povas pli unuigi la ĉinojn, kiel komuna lingvo, kaj la lernadon de Esperanto, kiel lingvo kiu devas unuigi la mondon.

Augusto Casquero

Kurso de Esperanto en Kantono (Ĉinio)

La 19an de majo komenciĝis en la sidejo de la Kantona Esperanto Asocio, organizita de ties Ĝenerala Sekretario, s-o Liu Weizhuang, kurso de Esperanto, kun la ĉefa celo prepari homojn por la baldaŭa okazigo de la tutlanda Ĉina Esperanto-kongreso. La instruadon gvidas la hispana esperantisto Augusto Casquero. Por tiu kurso oni uzas la lernolibron “Junulkurso”, ĉar la intenco estas paroligi la gelernantojn kiel eble plej rapide. Krom tio oni uzas aŭdvidajn helpilojn, ĉefe komputilajn rimedojn. La kurson partoprenas interalie 10 junaj studentinoj de la “Universitato pri Televido kaj Radio”, de la sama urbo.

Augusto Casquero



Augusto kun la kursanoj

## La nova generacio

Ekde la originoj mem de Esperanto, la disvastiĝad-maniero de nia lingvo ŝanĝiĝis iom post iom kaj evoluis kun la paso de la tempo. La unuaj iniciantoj de la lingvo internacia, ligitaj al la persono kaj la ideologio de Zamenhof estis sekvantoj de la baldaŭa naskiĝo de kluboj kaj asocioj tra la tuta mondo kun diversaj ideologioj kaj interesoj kelkefoje kontraŭaj inter si mem.

Esperanto baldaŭ ne nur estis la komuna lingvo de centoj da regionaj kaj urbaj asocioj kiuj trovis en Esperanto ian interesan novan ilon en la kampo de la lingvistiko, la internacia komunikado, la sciencoj kaj en la tuta kulturo. Nia lingvo ankaŭ interesis al diversaj sociaj kaj religiaj movadoj kiuj trovis en la lingvo internacia grandan utilecon por siaj respektivaj celoj.

Esperanto do subtenis sian neŭtralecon kaj netuŝeblan vivecon, ĉiuj povis uzi ĝin por la plej diversaj celoj, tamen unu el la plej gravaj problemoj kiujn havis nia lingvo ekde sia naskiĝo estis la transdonado kaj disvastigado de la lingvo al la sekvanta generacio.

Tra la jarcenta historio de Esperanto, miloj da personoj en la tuta mondo lernis kaj uzis Esperanton sed tamen nur malmultaj el tiuj esperantistoj

transdonis ĝin al siaj gefiloj. Se tiu estus okazinta en la estinto, hodiaŭ la nombro de homoj kiuj parolus Esperanton eble estus la triobla aŭ la kvarobla kompare kun la nuna nombro da parolantoj. Se iu intencas trovi ian rezonitan respondon al tiu fakto, ĝi estus malfacila kaj bezonus zorgan esplorado, tamen ni povas proponi kelkajn demandojn aŭ hipotezojn. Eble Esperanto same kiel la lernita angla de niaj lernejoj ne estis persone instruita al la gefiloj, aŭ estis nur por siaj estintaj parolantoj ilon aŭ hobion por amuziĝi dum la libertempo simila al la filatelo kaj ne estis por ili kultura havaĵo kiu devas esti transdonata al la gefiloj similmaniere kiel la patrinlingvo, la religio aŭ la ideologio.

Do, la normala vojo por disvastigi Esperanton kutime estis per la bonvola lernado en malgrandaj klubetoj kaj asocioj aŭ autodidaktike. Esperanto estas tiel, lingvo sen politika aŭ ekonomia apogo, lingvo bonvole akirita plimulte de kleraj kaj adoltaj personoj kiuj interesiĝis pri ĝi. Esperanto normale ne vivadas generacion post generacio en la sama familio aŭ regiono, male Esperanto estas lernata de generacio al generacio en malsamaj landoj kaj familioj. Tiun ĉi fenomenon mi trovis nur en la lingvo internacia, ne en alian.

Per tia formulo ni atingas lingvon

parolata de popolo kiu estas mikso de kleruloj, kuriozuloj kaj personoj kiuj interesiĝas pri la kulturo, la lingvoj, kaj ĝenerale pri la “strangaj aferoj”. Iuj estis ligitaj de kulturo naskiĝinta de lingvo tute malkonata de la plimulto de la socio. Iom post iom, generacion post generacio Esperanto estis pli kaj pli stranga kaj malkonata por la normalaj homoj, ĝis Esperanto fariĝis la **Ferma Lingvo**.

Aliaj trovas Esperanton per diversaj ideologioj, aŭ kredoj kiuj historie uzis kaj simpatiis kun la internacia lingvo kaj poste preskaŭ ĝin forgesis. La esperantistaro estas do ĉiam diversa kaj pentrinda, ĉiam nova, ĉiam senradika, dispersa, sen klara estinto nek rekta transdonado al la estonto, la eterna semo kiu nur vidas sin mem sen zorgi kio okazas ekstere. Tiu generacio de esperantistoj neniel rilatas al Zamenhof nek al origino mem de la lingvo kiu celis esti komunikilo por la internacia kompreno inter ĉiuj popoloj de la homaro kaj ne ludilo por aro da homoj kiuj uzas ĝin dum sia libertempo.

Esperanto ne estas pro tio, tio ne estas ĝia celo. Esperanto naskiĝis por esti la internacia lingvo inter ĉiuj popoloj, lingvoj kaj kulturoj. Certe estas, ke Esperanto kreis sian propran kulturon, sed ne estas celo de Esperanto nek de esperantistoj centriĝi je si mem. Esperanto ne naskiĝis por krei novan popolon nek nacion sur la Tero sur komuna lingvo, Esperanto ĉiam serĉis la dialogon kaj la komunikon inter la jam estantaj nacioj kaj popoloj.

Ĝis ne delonge la falo de esperoj, kaj la granda malproksimo inter la geesperantistoj favoris la tendencon al la centriĝo sur la esperantistaro mem kaj sur ĝia propra historio kaj kulturo kaj ni preskaŭ forgesis la laboron de disvastigado al la ekstera mondo kiu ĉirkaŭas nin. Tamen, Interreto kaj la evoluo de la novaj teknologioj signifis grandan revolucion ĉie, ankaŭ en la esperanta komunumo.

Miloj da personoj tage malkovras esperanton rete, la ekzisto de lingvo neŭtrala kaj de neniuj, per kiu oni povas komuniki senprobleme kun centoj da miloj da homoj ĉiulande, lingvo kiu ebligas vojaĝi kaj vidi novajn mondojn ĝis tiam kaŝitaj kaj nekonataj. Tiuj novaj esperantistoj lernas kaj studas la lingvon sen ligiĝi al iu ajn klubo aŭ asocio, ili naskiĝas rekte de la originala esperanta movado, tio estas, ili vidas en esperanto veran universalan lingvon ne nur dekelkaj homoj sed de ĉiuj kiuj volas partopreni de ĝi.

La novaj esperantistoj pensas ke Esperanto estas alternativa kaj farebla elekto, bona alternativo al la kultura kaj lingvistika diskriminado kiu nun okazas kiam kelkaj malmultaj lingvoj regas super aliaj, aŭ eble estu pli ĝuste paroli pri la diskriminacio de “nur unu lingvo super la aliaj”: la angla.

Tiu ĉi nova generacio naskiĝinta en la reto apenaŭ nenion scias pri la esperanta historio, la kluboj, aŭ la malsimplaj politikoj prenitaj de multaj

asocioj plenaj de teknikaĵoj kaj malfacila terminologio malkomprenebla por kiuj nur simple parolas la lingvon internacian. Neniu scias kiom da ili estas, sed ilia malvidebla kreskado ne ĉesas. Ili ne havas klubokarton sed ili parolas kaj uzas la lingvon.

Se alia mondo estas ebla, ia nova komunikad-maniero pli justa kaj demokratia ankaŭ eblas. Tio estas la konvinko de tia nova generacio ĵus naskita rete en Esperantujo. La esperantistoj devas labori kune, novaj kaj malnovaj ni devas lerni unu de la aliaj, rekapti la verdan animon de la originoj de Esperanto valorante la spertojn de kiuj antaŭestis. Nur tiel ni povos savi la verdan esperon en mondo pli kaj pli malgranda kie samtempe ni sentiĝas pli kaj pli malproksimaj de la aliaj.

Nur tiel ni povos solvi la problemojn kaj la avantaĝojn de ĉi tiu ĵus naskita jarcento, ĝi proponas al ni batali por la normalizado de Esperanto kiel lernebla lingvo en la Eŭropa edukosistemo.

Ni faru el nia lingvo havaĵon doneblan al niaj gefiloj, kaj el nia kulturo universalan heredaĵon malferman al ĉiuj kiuj volu partopreni en ĝi. Ni faru el Esperantujo ian internacian komunumon kiu bonvenigu al la tuta homaro.

Fabián Jiménez

---

Internacia Esperanto-Muzeo, fako de la Austria Nacia Biblioteko, aperigis 100 librojn skanitajn de la plej frua epoko de Esperanto, inter ili la unua gramatiko de Zamenhof.

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>

---

## Klaku.net

Tiu nova ret-paĝo prezentas samloke ligilojn al novaĵoj kaj informoj de diversaj fontoj, ordigitaj laŭ populareco decidita nur de la uzantoj, kiuj povas doni poentojn per simpla klako kaj opinii. Ajna registrita uzanto povas rapide inkludi novan ligon, aldonante malgrandan priskribon. Se la aliaj retumantoj konsideras ĝin sufiĉe interesa, ĝi aperos inter la unuaj. La ekzistokialo de tiu nova servo estas, ke la blogoj kaj informaj paĝoj en esperanto estas disigitaj kaj ne facilas trovi la plej interesajn informojn. La paĝaro baziĝas sur libera kodo Pligg, kiu multe similas al tiu de la hispana “meneame.net”





En ĉi tiu numero ni prezentas poemon de Francisco Javier Moleón dank' al kiu li gajnis la premion pri poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA. La aŭtoro eklernis Esperanton estante 16jara en 1981. Li laboris kvin jarojn en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, 1986-1991, kie li ĉefe okupiĝis pri redaktado de la Jarlibro. Estinte tre vigla esperantisto, li duonkabeis – aŭ almenaŭ ĉesigis la movadumadon – ĉ. la jaro 1993. La lingvon tamen li nek forgesis nek mallernis – la Esperanta vorto do, malsame al Kabe, al li daŭre ne sonas arabe.

## Sed Tiam

Ne amu min tiam,  
kiam

printempo alvenas kaj suno belas  
kaj belo ŝprucas kaj birdoj krucas  
nian vojon  
sin kisantaj,  
ĝoje mallantaj,  
enamiĝintaj.  
Kia feliĉo! Kiam en bobelo ni ŝvebas  
de amo pura, de amo nura  
kaj problemoj ne ekzistas, eĉ ne estas.  
Kiam mi rigardas vin kaj sentas  
la universon en paco.  
Kiam mi afablas, simpatias,  
mia suna flanko elradias.  
Kiam miaj cirkonstancoj  
enordas  
kaj mi feliĉas kaj satas.  
Kiam estas mi  
papili'  
gajflirtanta en aero...<sup>1</sup>  
Kiam tago brile helas




kaj en buŝo dolĉmielas,  
dum mi gajas en intim'.  
Kiam birdoj kantas, saltas  
kaj la koro batekzaltas,  
ĉar mi ree vidos vin!  
Kiam  
la vivo ĝustas.



Ne tiam amu min.

Sed tiam,

kiam puŝo elfluas el la buŝo,  
kiam kiso al ĉi vizaĝ' ŝvela  
naŭzas, kiel ĉe leprul' kunkuŝo.  
Kiam falas kaskoj, falas maskoj  
kaj rikanas senmensoga vero,  
povra vero, nuda vero...  
Kiam dentoj grincas, kiam saĝo mincas  
kaj pro sango ne videblas lango.  
Kiam helpon mi bezonas  
por superi la penon vivi.  
Kiam mi abomenas  
la ĉenon  
kaj ĝin ne volas pluigi.<sup>2</sup>  
Kiam abismo ekzistas  
kaj ĝia fundo proksimas  
(ne esploru  
kavernojn de l' animo).<sup>3</sup>  
Kiam mi ne plu eltenas,  
kiam amikino mia dolĉa  
min obsedas...<sup>4</sup>  
Kiam fantomoj de l' pasinto  
ne estas de l' pasinto.  
Kiam vomo, stertoro  
ĉeestas,





kiam ratoj  
amikemas,  
kiam brutalo  
malfremdas.  
Kiam kerno de l' bestio  
aperas.

Kiam vivo estas  
viva.  
Kiam vivo estas,  
kia ĝi estas.  
Kiam vivo sin montras,  
kia ĝi estas.

Tiam amu min.

Francisco Javier Molecón

- 
- 1, Aludo al versoj de la rusa poeto Eŭgeno Mihalski (1897-1937), kiuj tekstas: “Estas mi / papili’ / gajflirtanta en aĉero, / dancas mi, / ĝojas mi / tutan tempon dum somero”.
  - 2 Aludo al la verko *La infana raso* de la skota poeto William Auld (1924-2006). La “ĉeno”, kiel konantoj de *La infana raso* scias, estas la sinsekvo de la homoj el la pratempo ĝis nun, kaj plu. Estas do klaraj la signifoj de “abomeni la ĉenon” kaj “ĝin ne voli pluigi”.
  3. Denova Aludo al William Auld. La versoj de Auld tekstas: “De malantaŭe / kroĉmane tiris timo / manikon mian / kaj flustris: / ‘Ne esploru / kavernojn de l’ animo’”. La aŭtoro de la nuna poemo trovis ĝin antaŭ multaj jaroj en la lernoverko por hispanlingvanoj *Nuevo método de Esperanto*. Li citas la ĉi-suprajn versojn laŭ memoro, do povis enŝteliĝi eraroj, sed malverŝajne. Li ne scias, de kiu verko de Auld tiuj versoj devenas, aŭ ĉu ili estas memstara poemeto.
  4. Aludo al la eksterordinara poemo de la italo Aldo de’ Giorgi (1924-2003) *Amikino mia dolĉa*, trovebla en la verko *Pretertempe*. En la poemo De’ Giorgi parolas pri tiu sia amikino, lia “kara vivinstigo” kaj “akompanantin’ fidela” de ĉiuj penoj liaj. La nura prezenco de la amikino helpis lin superi multnombrajn obstaklojn, kaj la konstanta memoro pri la amikino daŭre helpis lin elteni sian desperon kaj seniluziigojn. En si mem nenio eksterordinara, nura dankopoemo respogulanta ordinare romantikan situacion. Nur, tiu amikino estas – lia revolvero.

# Kelkaj fotoj pri la kongreso



Junuloj relative abundis.  
Ĉu nova 'generacio'?



Post la ekskurso al Punta Umbría (supre) kaj en ŝipeto



'Solo' koncertas

